

Stipendikonkurso de ILEI, Busano 2017

La Estraro de ILEI anoncas konkurson pri stipendioj al 22 aliĝintoj de la 50-a Kongreso de ILEI en Busano, Korea Respubliko, 15–22 julio 2017, el kiuj

- 4 infanoj po 110 EUR por partopreno en la Infana Universitato
- 10 junuloj po 130 EUR por partopreno en instruista trejnado aŭ progresiga Esperanto-kurso
- 8 plenkreskuloj po 140 EUR por partopreno en instruista trejnado.

La stipendioj estos enpagitaj el stipendiaj fondusoj de ILEI rekte al la kongresa kaso kiel

- kongreskotizo
- parto (100 EUR) de loĝkostoj en la junulargastejo Arpina (la kongresejo)

Gajnintoj de la stipendio mem pagos siajn vojaĝkostojn, vizkostojn kaj ceteron de la restadkostoj super 100 EUR, ĉu per propra mono ĉu per helpo de aliaj stipendiantoj aŭ amikoj.

Kondiĉoj

La stipendion povos gajni aliĝintoj kiuj:

- + ne ĝuis kongresstipendion ajnafontan en la lastaj 4 jaroj
- + ne partoprenis ajnan kongreson de UEA, ILEI aŭ TEJO en la lastaj du jaroj
- + havas subtenon de landa asocio/sekcio, aŭ UEA, aŭ TEJO, aŭ kontinenta komisiono de UEA, aŭ estrarano de ILEI, por gajni la stipendion
- + akceptas plenumi kelkajn taskojn dum la Kongreso helpe al la organizantoj (deĵorado, protokoloj, ordigado de ejoj, enketoj inter kongresanoj)

Kiel konkursi?

- + Bonvolu aliĝi per aliĝilo atingebla tra <http://www.ilei.info/agado/Busan2017.php>.
 - En la aliĝilo elektu la pagmanieron "al ilek-a"
 - En Komentoj indiku: "Mi petas stipendion. Mi deziras partopreni en ..."
- + Sendu en aparta dosierojvian sinprezenton kun motivoj por la stipendio kaj via subtenanto sendu sian rekomendon al radojica.petrovic.rs@gmail.com kaj ilei.sekretario@gmail.com

Limdato: 2017-04-30

Ĉiu peto estos traktata tuj post alveno kaj la stipendioj estos tuj aprobataj al plenumintoj de la kondiĉoj ĝis elĉerpiĝo de la stipendifonduso.

2017-01-27

Estraro de ILEI